# RETKOMUNIKOJ 3/2010

ĈEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonaĵojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO:
1. ĈEA-KONFERENCO ESTAS „ANTAŬ PORDO“!
2. KONFERENCE ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU JE PŘEDE DVEŘMI!
3. EL LA CETERAJ E-ARANĜOJ EN ĈEĤIO (KAJ SLOVAKIO)
4. ALVOKO POR LA ORGANIZANTOJ DE E-ARANĜOJ
5. www.esperanto.cz EN NOVA MANTELO

1. ĈEA-KONFERENCO ESTAS „ANTAŬ PORDO“!
Ne maltrafu la lastan ŝancon aliĝi al la ĉi-jara ĈEA-konferenco, okazonta 24.-26.9. en ĉarma kaj kvieta medio de la banloko Poděbrady! NE necesas pagi krompagon 100,-Kč pro malfrua aliĝo! Al interesuloj ni proponas eblecon plilongigi la restadon ĝis mardo 28.9. (kiu estas ŝtatfesto).
Krom kutima labora kaj kleriga programo atendas vin promeno tra la urbo, du kulturaj vesperoj (unu muzika kaj danca, unu kun filmprojekciado) , elekteblaj ekskursoj kaj komputila seminario. Informoj: cea.polnicky@quick.cz

Detalan programon, kotiztabelon kaj aliĝilon vi trovas en http://www.esperanto.cz/cs/akce/konference-ces-299.html.

2. KONFERENCE ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU JE PŘEDE DVEŘMI!
Nepropásněte poslední příležitost přihlásit se na letošní konferenci ČES, která se bude konat 24.-26.9. v půvabnéma poklidném prostředí lázní Poděbrady! NENÍ nutno platit příplatek 100,- za pozdní přihlášku! Zájemcům nabízíme možnost prodloužení pobytu až do úterý 28.9. (kdy je státní svátek). Kromě obvyklého pracovního a vzdělávacího programu na vás čeká procházka městem, dva kulturní večery (jeden hudební a taneční, jeden s promítáním filmů), volitelné výlety a exkurze a počítačový seminář.

Bližší program, ceny a přihlášku naleznete na http://www.esperanto.cz/cs/akce/konference-ces-299.html.

3. PLUAJ ARANĜOJ OKAZONTAJ EN ĈEĤIO (KAJ SLOVAKIO):

11.-17.10.2010 RENKONTIĜO EN ĈEĤA PARADIZO – Amika renkontiĝo de esperantistoj kaj favorantoj de Esperanto en la pensiono Skokovy. Diskutoj, ekskursoj, artkreaj atelieroj, ebleco de resanigaj proceduroj. Info: drahotova@esperanto.cz

18.-21.11.2010 KAEST – Konferenco pri apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko en Modra (Slovakio). Info: petro@ikso.net, http://www.ikso.net/kaest/

4.12.2010 – MARCIPANA KRISTNASKO en Esperanto-Muzeo en Svitavy

Ŝatata ateliero, dum kiu vi povos mem lerni, kiel krei kristnaskajn kaj novjarajn figuretojn el marcipano. Taŭgas ne nur por infanoj! Ebleco viziti ev. adventan programon enurbe. Info: dvor.libuse@seznam.cz

11.12.2010. AnkRo – ANTAŬKRISTNASKA RENKOTIĜO en Písek – kultura matineo en la biblioteko omaĝe al „Tago de Esperanto-libro", adventa programo en la urbocentro, solena kristnaska posttagmezo. Info: pisek@esperanto.cz

## 4. ALVOKO POR LA ORGANIZANTOJ DE E-ARANĜOJ

En venonta numero de ĈEA-retkomunikoj ni planas aperigi denove la Kalendaron de la E-eventoj, tial ni petas ĉiujn organizantojn, ke ili informu nin al chrdle@kava-pech.cz sendante informon jam en Esperanto, kiu enhavas minimume la nomon de la aranĝo, lokon, daton, kaj retan kontaktadreson (kaj se ekzistas, ankaŭ ligilon al la retpaĝo, kiu pri ĝi informas). Komprenu, ke ne eblas envicigi la aranĝon, pri kiu ni ne scias.

Atentu, ke en la E-kalendaro de ĈEA-retkomunikoj estas envicigitaj nur eventoj okazontaj en Ĉeĥio aŭ organizata de Ĉeĥio. La plej kompletan kalendaron de Esperanto-eventoj en la tuta mondo, sed ankaŭ plurajn utilajn informojn, vi trovos ĉe www.eventoj.hu

## 5. 5. www.esperanto.cz EN NOVA MANTELO

NE FORGESU regule vizitadi la retpaĝaron de ĈEA www.esperanto.cz, kie vi trovos pliajn aktualajn informojn kaj utilajn kontaktojn! (Nuntempe plenfunkcias nur la ĉeĥlingva versio, la esperantlingva estas finprilaborata kaj estos baldaŭ lanĉita). Viajn reagojn, proponojn por plibonigo kaj kontribuojn bv. skribi al: komputado@esperanto.cz.